FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto : S-ro R. CL. COLAS,- 6, rue de Mézières - 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY,-43,quai de Champagne - 94170 LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

C.C.P.- Association Cath. Franç. pour l'Espéranto - ROUEN - 23 24 93 N.-

=== le N° : 1,50 Fr; --- Abono : 5 Fr-; kotizo : 1 Fr-; === sume : 6 Fr====

::

Sendu la materialon por la bulteno al S-ino J. VINCENT, antaŭ la 20-a de marto, junio, septembro kaj decembro.

++

=== N° 101 --- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----------

======== Sankta PIO-Xa, preĝu por ni.

------ Julio 1974 -----

==========

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

K O N G R E S O de F.K.E.A. en ANGERS.

J'ai l'agréable devoir, au nom de notre Association, de remercier ici tous ceux qui ont contribué au succés de notre journée d'étude et de reflexion d'Angers.

Nous avons été trés sensibles aux marques de sympathie et à l'encouragement que nous a apporté la présence à nos débats et à notre table de Monseigneur MAZERAT. La conférence de Monsieur l'Abbé BAUDRY a été trés appréciée, et l'exposition des livres et des revues, témoignage de l'Espéranto vivant et universel a été, autant que des paroles un argument convaincant pour ceux qui sont venus animés par une certaine curiosité.

La Presse régionale a réservé une place dans ses colonnes aux échos de notre réunion et nous remercions les journalistes qui ont rapporté leurs impressions de nos travaux sous le signe de l'OEcuménisme et de l'Universalisme.

Le lieu de notre réunion, cette claire et agréable maison Sainte-Anne, avec son parc si agréable, a contribué à l'ambiance cordiale et fraternelle, et nous remercions ici le Père Directeur de l'accueil que nous y avons reçu.

R. Cl. COLAS.

==========

Eltiraĵo de la raporto de la estraro de la Franca Katolika Esperanto Asocio, prezentita de S-ro R.Cl. COLAS.

Karaj gesamideanoj,

En la nomo de la estraro, mi salutas tutkore niajn anojn kaj amikojn, kiuj venis aŭ sendis perletere al nia kunveno aliĝon kaj partoprenon. Al la Loka Organiza Komitato, kiu tiel sindoneme kaj lerte preparis tiujn tagojn, al la Pastro direktoro de la "Maison Ste-Anne", mi dediĉas tre varman dankon.

Monsinjoro Episkopo MAZERAT konsentis doni al niaj loboroj sian protektantecon; ni estas tre dankemaj al li pro la apogo de li donita al niaj celoj; en la tutmonda esperantista movado, multaspekta, estu la katolikoj ĉiam alestadantaj, kaj en ĉiuj lokoj, estu Dio laŭdata!

Dum la jaro 1973/74, nia Asocio vivadis en siaj lokaj rondoj kaj la estraro kunvenis regule en Parizo; la servo de nia bulteno estis la ligilo kaj informilo inter ĉiuj. Estis por mi ĝojige vidi U.F.E.

.../...

.../...

endomiĝintan en sian novan sidejon, multe pli allogan ol la malnova; ni precipe gratulas S-rojn Albault, Despiney kaj Royer, kiuj tiel bone sukcesis en tiu tasko, kaj mi tutkore dankas U.F.E. pro la akcepto de niaj komitatkunvenoj. Ni estas feliĉaj pro la solidareco de niaj anoj kun la aliaj francaj esperantistoj, kiuj subtenis tiun necesan entreprenon.

Nia kongreso okazis en Montmartre en 1973. Tie ni havis la plezuron renkonti amikojn el la provincoj kaj pripensi kun ili perspektivojn por nia movado. Ni esprimis kaj denove esprimas la deziron, ke niaj anoj pli plene kaj pli multnombru niajn laborojn kaj konigu nian asocion, niajn celojn kaj klopodojn.

Nia bulteno aperas regule, dank' al S-ino Vincent, sindonema redaktorino kaj F-to René-Jean Marmou, kiu ĉiutrimonate presas kaj dissendas ĝin. Interalie, la "Lingva angulo" estas tre ŝatata kromrubriko; ni dezirus, ke nia informilo, kvankam senluksa, estu bona kaj utila propagandilo kaj atestu pri vivanta Esperanto.

Ni tute speciale volas instigi vin al la legado de Espero Katolika; dum 70 jaroj, ĝi estis la internacia ligilo inter niaj kredfratoj; ĉiam vivanta, ĝi estas unu el la plej aĝaj internaciaj Esperanto-revuoj. Jam en la komenco de la jarcento, Pastro Peltier, Pastro Richardson kaj aliaj tro frue forpasintaj pioniroj de la enkonduko de Esperanto en la katolikaj mediojn, pripensis la unuecon de la kristanaro per Ekumenismo kaj agnoskis la plenan signifon evangelian de la devizo "Unu ŝafaro, unu paŝtisto".

Ni substreku ĉi tie la projektitan renkonton inter KELI kaj IKUE en Hamburgo la 27-an de Julio en la kongresurbo de UEA kaj ni esperas ke nia asocio estos tie reprezentita.

Nia movado multfoje funebris kaj la morto frapis kelkajn el niaj tre amataj pionoroj; inter ili S-ino Grafino de Briey, kiu aliĝis al nia kunveno. Dum la Sankta Meso, ni petu de Dio por ili ĉiuj la eternan ripozon.

Mi ne povas fini tiun moralan raporton ne dirante, kiom necesa estas la agado apud la katolikaj movadoj, pastraro, instruistoj, gejunuloj, informiloj por konigi niajn celojn kaj lernigi nian lingvon: estu ĝi praktike uzata por pli da amo kaj pacemo inter la homoj de ĉiuj landoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LA PREĜO DE LA PEKULO

La kvina poemo de Lamentoj ŝajnas ne grava, kiam oni komparas ĝin al la kvar aliaj. Tamen en nia malnova liturgio, oni kantis ĝin per la plej bela melodio, korŝira melodio eble veninta el la sinagogoj. Tio estis ne sen praveco, ĉar tiu simpla preĝo estas tiu de la fidelaj pekuloj, do la nia.

Kompare al la aliaj, ĝi jam aspektas pli kvieta. En la aliaj poemoj la alvoko al Dio ŝprucas post longdaŭra mizerkrio; en tiu ĉi, ĝi staras komence, kaj la rememorigo de la suferitaj mizeroj emfazas ĝin "Rememoru, Sinjoro, vi restadas por ĉiam. Via trono eternedaŭre ekzistas..." (5,19)

La kredo deklaro nun estas la tre plena adorado de la eterna Reĝo "Sed Vi, Sinjoro, Vi restadas por ĉiam, Via trono eternedaŭre ekzistas".

La espera estas kiel eble plej alta kaj interna, kiel konversacio. Kiel Jeremio, la saĝulo scias, ke la koroŝanĝo estas nepre petata de Dio kaj, poste sekvos la aliaj gracoj : "Konvertu nin, Sinjoro, kaj mem konvertiĝos" aŭ "Revenigu nin, Sinjoro, kaj ni revenos" (Lm 5,21 Jer 31-18). Sed tiu graco ne estas por ni rajto, kaj la preĝo finiĝas tre humila "Ĉu vi tute malakceptu nin, neelmezureble kolerinta kontraŭ ni ?" (Lm 5,22)

(El "La Bible et son message" N° 61-)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

BIBLIA VORTO PACO

"Mi donas al vi mian pacon; mi ne donas ĝin, kiel la mondo"(Jn14,27) ĉu do estas pluraj diversaj pacoj ?

Estas tiu, kiu estas nur militneesto. Ne necesas klarigo : tio estas la plej komuna vortosenco.

Sed la etimologio de la hebrea vorto ŝalom invitas pristudi ĝin pli funde : ĝia radiko indikas la econ de kio estas kompleta, harmonia. Stari en paco do signifas, laŭ la okazoj : bonfarti (Gn 43,27)- esti familiara al iu; oni diras "la viro de mia paco"(Ps 41,10) aŭ ankaŭ rilati kun iu; tiel kiam oni oferdonas "buĉoferojn de paco" tio signifas la kunrilaton inter la homo kaj Dio (Lv 3,1). La senceremonia saluto ŝalom, kiel nia "saluton" estas amika bondeziro al paco.

La libro de la proverboj (12,20) komparas la pacohomon (al li la ĝojon) al tiu, kiu primeditas la malbonon (al li la amarecon). Estas samvaloreco en la Biblio inter la "justulo" kaj la "paculo"; al ambaŭ estas promesita la sama feliĉo (Ps 37,29 k 37). La evangelia feliĉego de la pacamanto (Mt 5,9) staras en tiu senco.

La paco estas difavoro de tiu "Pacodio" al kiu Gideono konstruas altaron(Jĝ 6,24). Estas Li, kiu donas la pacon al sia servisto (Ps 35 27), al tiu, kiu fidas Lin (Ps 29,11). Li ne donas la senvaloran pacon, kiam homoj diras "Pacon, pacon kaj ne estas paco"(Jr 6,14) sed la veran pacon, kiu ekzistas, kiam malaperas la peko.

Do la promeso de la tutpaco situas en la estonta perspektivo, kiam la "Pacoprinco" donos "senfinan pacon" (Jes 9,5-6). Tiun pacoprincon Jesaja vidas, kiel la suferantan Serviston, kiu redonas al ni la pacon, prenante sur Si mem niajn pekojn (53,5)

La ŝalom de releviĝinta Kristo, kiam Li aperas al la disĉiploj fariĝis nia liturgia saluto "La paco de la Sinjoro estu kun vi". ĝi asertas, ke la paco konkerita per la krucosango estas la vera paco (Kol 1,20), kiu repacigas ĉiujn kun Dio.

(El "La Bible et son message N° 65)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

OECUMENISME ET ESPERANTO

Réunis en table ronde, samedi 11 mai 1974, les participants à notre congrès d'Angers, auxquels s'était joint M. l'Abbé Raynaud, directeur des OEuvres diocésaines, ont très librement parlé des rapports entre l'oecuménisme et l'espéranto.

Mr Bachelier, espérantiste protestant, devait courageusement ouvrir la discussion en soulevant le problème de la communion refusée aux non-catholiques lorsqu'ils assistent à une messe. Cette règle de discipline ecclésiastique lui a été particulièrement pénible lors du dernier congrès à Klagenfurt (Autriche). Il est certain que ce problème est douloureux, car il marque le point central de nos divisions et ne peut être résolu pour l'instant.

Mais les débats s'élargissent aussitôt pour remarquer que l'oecuménisme doit être entendu comme l'accueil fraternel de tous nos frères y compris ceux qui appartiennent à des confessions non-chrétiennes, lesquelles sont en train de pénétrer l'Europe par suite de la diffusion des moyens de communications sociales.

Chacun reconnait que, par l'espéranto, on communique avec des étrangers de tous pays. La langue universelle fait tomber les barrières et c'est alors, que se connaissant mieux, on s'estime davantage tout en découvrant les divisions chrétiennes. Pour beaucoup dela constitue une désillusion et renforce le désir de loecuménisme, lequel fait de grands progrès depuis quelques années.

Et c'est parce que l'espéranto est un lien et un outil merveilleux pour les relations avec les étrangers, que nous ne devons cesser de le pratiquer, principalement avec ceux de nos frères qui sont privés de lectures chrétiennes. On ne peut donc qu'encourager l'envoi dans les pays concernés de revues chrétiennes rédigées en espéranto, car elles sont lues par de nombreuses personnes. Il faudrait que les mouvements d'Eglise, et en particulier Pax Christi en prennent conscience et développent l'étude et l'usage de la langue internationale comme moyen pratique de rapprocher les peuples et de partager avec eux notre Foi.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

JARKUNVENO 1974

La 12-an de majo, la prezidanto S-ro Colas malfermas la jarkunvenon de nia asocio kaj salutas la 22 ĉeestantojn. Li legas leterojn de F-to Marmou, S-roj Ribot kaj Bode(Germanujo), kiuj ne ĉeestante la kunvenon salutas ĝin. Aparte menciinda estas salutletero de la monaĥoj de Sept-Fons, kiuj deziras sukceson al nia afero.

S-ro Colas varme dankas M-ron Mazerat, episkopo en Angers, kiu, vizitante nian kongreson, faris al ni grandan honoron. Li ankaŭ salutas la memoron de S-ino Grafino de Brey, kiu mortis ĵus antaŭ la kongreso, kiun ŝi diligente instigis kaj preparis.

En sia morala raporto, la prezidanto gratulas la nacian asocion pro ĝia nova sidejo kaj la afabla akceptado de niaj estrarkunvenoj en ĝia ĉambro. Li indikas, ke nia modesta bulteno interesas la anojn, kiuj tre ŝatas la rubrikon "Lingva angulo" kaj fine emfazas la gravecon de la venonta kristana kongreso en Hamburgo.

S-ino Vincent legas la bilancon de la jaro 1973.:

ENSPEZOJ			ELSPEZOJ	
Kotizoj	996,00	"	Bulteno	470,84
Donacoj	74,00	"	Korespondado	84,31
Profita kongreso	30,00	"	Diversaj	108,00
Rentumo ŝparkaso	117,35	"		
Saldo 1/1/73	2.423,20	"		
	3.640,55	"		663,15
Saldo 31/12/73	2.977,40			

S-ino Vincent diskonigas, ke pro la prezaltigo, ĉefe de la papero, ni eble devos altigi la kotizon. Laŭ propono de S-ro Bessière, la kunveno permesas al la estraro altigi, se necese, la kotizon ĝis 10 Fr-.

La ĉeestantaro aprobas la moralan kaj financan raportojn kaj renovigas parton de la estraro. S-roj Barrier, Véron, S-toj Bourdon kaj Degrelle kaj S-inoj Michau kaj Vincent estas unuanime elektitaj aŭ reelektitaj.

La estraro multe bedaŭras, ke pro nekonata poŝta malfacilaĵo, la aprila bulteno ne ĝustatempe alvenis ĉe multaj anoj. Oni plendos ĉe la poŝtaj instancoj por ke tiu malagrablaĵo ne denove okazu.

La kunveno decidas kongresi venontjare en Lille kaj fiksas la daton je Pentekosto. Ĝi ankaŭ aprobas venontan propagandon ĉe la katolikaj ĵurnaloj, kiuj bedaŭrinde ne sufiĉe atendas pri Esperanto kaj ties graveco.

Protokolis A. Bessière.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LINGVA ANGULO

Novajn tradukojn de la januaraj proponoj sendis S-roj Broise (B) kaj Lecroisey (L).

1) Kontraŭvole ridi (B); 2) Estas tute identa afero (B); 3° senĝene prizorgi la farojn de iu (L). 4) doni movfacilecon al (B); pli facile ekglitigi (L); 5) oferi parteton por savi la ceteron (B); 6; solene promesi (L). 7) tutmontri siajn favorajn kartojn (argumentojn) (B); 8) sin defendi ekster sia povo (L); 9) samtonigi siajn argumentojn (B); bonege harminiigi siajn vidpunktojn (L).

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Tradukojn de la aprilaj proponoj sendis S-roj Bourgois(B), Despiney (D), Guillon (G), kaj s-ino Michau (M).

1) kroĉi sian rigardon (B); al si altiri la atenton (D); veki atenoton (G); altiri atenton (M).- 2) tutcertiĝe (B); pro honesteco(G) pro tuta konscienctrankvilo (M).- 3)fari heroaĵon, distingiĝi per brila kuraĝaĵo (B); fari eksterordinaran agon (D); plenumi brilan agon (G); rimarkinde agi (M).- 4) la afero nepre sukcesos (B); la sukceso de la afero estas certa (D); la afero estas bone farota (G); la afero estas bone farota (G); la afero estas kvazaŭ traktita (M).- 5- firmigi sian aŭtoritatecon (B); firmigi sian estrecon (D); montri sian firmecon(G) pruvi aŭtoritatecon (M).- 6) suferi la turmentojn de l' agonio, baraktí kontraŭ la morto (B); la turmentoj de l' morto (D); suferi kiel mortonta (G); agonie angorsuferi (M); -7) li iraĉu for !(B); li faru ion ajn for de ni! (D); li turniĝu al loken! (M).- 8) malafablega (B-G)

acide afabla (B); kun malagrabla sinteno (D); alloga kiel mallibereni-rejo (M). 9) ŝajnigi naivecon, simplanimecon (B); ŝajni nekoncernata (B); ŝajnigi apation (M).- 10) ŝajni distre revanta, droni en la revado, mense foresti (B); li estas kiel neĉeestanta (D); aspekti kiel forestanto (G); laŭŝajne revi (M).

La honorpalmon al S-ino Michau !

Erratą : en la aprila N), bonvolu legi : "sindevige ridi" kaj " ian malagrablaĵon"

&&&&&&&&&&&&&&&&

Novaj proponoj de S-ro Bourgois : 1) ne pas y aller de main morte; 2) ne pas y aller avec le dos de la cuiller; 3) s'en aller en eau de boudin; 4) ne pas y aller par 4 chemins; 5) il n'y a pas âme qui vive; 6 faire amende honorable; 7) il y a anguille sous roche; 8) faire antichambre; 9) aprés lui on peut tirer l'échelle; 10) s'armer de patience.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA MEMBRARO .

Novaj membroj 1974 : 11) S-ino POTIN (M & L); 12) S-ro FABRE (P.A); 13) F-tino MARIE (M & L); 14) F-ino GOUDE (I & L).

Fratan bonvenon al ili !

Dumvivaj membroj : 32) F-ino MAUCHIEN (Somme); 33) S-ro LAFARGUE (L-A) 34) F-ino PREUX (Nord); 35) S-to BOURDON (P-de-C).

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NEKROLOGO

La 23-an de aprilo forpasis an Ste-Christine-en-Mauges (M &L) en sia 83-a vivjaro, nia dumviva animo, S-ino Grafino de Briey, honorprezidantino de la Angers-a grupo. Ŝi verŝajne estis la lasta en Anjou kiu persone konis D-ron Zamenhof. Sia patro, Markizo de Contades, estis unu el la Esperanto-pioniroj; pro tio, tre juna, lia filino partoprenis en la fruaj U.K., i.a. tiun en Barcelono en 1909. Ŝi iniciatis nian kongreson en Angers kaj ĝojis ĝin partopreni, kiam la morto senkompate forprenis ŝin.

Ni preĝu po la ripozo de ŝia animo !

§§§

per viaj piedetoj ? - Oni faras,kion oni povas, modeste respondis la etulo, kion oni povas ... "

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LA DU TALENTOJ.

Ofte, kiam mi auskultis la legadon de la Evangelio pri la parabolo de la talentoj, mi kredis, ke talento estis monero simila al la niaj - tio estas - sufiĉe malgranda por esti prenita per du fingroj. Tute ne! Biblia talento el oro pezis ĉirkaù 34 kg ! Tia monero nun valorus ĉirkaù 900.000 Fr (nunajn)

Tamen ekzistas talentoj ankoraù multe pli valoraj : temas pri nematerialaj talentoj.

Dum la diservo de nia kongreso la 12-an de majo en Angers, Sto Goudé en sia prediko parolis al ni pri du talentoj : nia kristaneco kaj nia universala lingvo Esperanto. Ilin oni devas valorigi. Pli kaj pli oni devas progresi en la amo al Dio kaj al niaj proksimuloj. Oni ankaù devas pli kaj pli labori por progresigi Esperanton. Esperanto estas la parto de la kampo de l' Patro, kiun ni devas kulturi. Oni devas antaùenpuŝi Esperanton en niajn ekleziojn kaj en la aliajn rondojn Granda estas la laboro. Necesas multaj laboristoj ! Ju pli ekike-laboros tiuj laboristoj des pli ili estos veraj kristanoj, ĉar ili estos kiel iloj en la mano de la Sinjoro.

Kuraĝo, humileco, karitato kaj persistemo estas la necesaj virtoj por valorigi niajn du talentojn.

Do ni ne timu ! Kuraĝe ni antaùeniru !

Roger DESPINEY.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1974

FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr

IKUE kun "Espero Katolika"	21 Fr
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo".....	5 Fr
Peranto : G. Véron, C.C.P. - ROUEN - 11 88 63 Z.-	
ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto"	6 Fr
Infano malpli ol 16-jara	3 Fr-
Membro bonfaranto	30 Fr-
Dumviva membro	120 Fr
UFE kun "Revue Française"	50 Fr
UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro"	68 Fr

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto,-ROUEN - 23 24 93 N.-

=+=+=+=+=+=+=+=+= FrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFrFr £££££££££££££ $$$$$$$$$$$$ FrFrFrFrFrFrFr =+=+=

E N H A V O .

paĝoj		paĝoj	
1	: Kongreso en Angers	" 4 & 5	: Lingva angulo
1 & 2	: Eltiraĵo de la raporto F.K.E.A.	" 5	: Nia membraro
		" 5	: Nekrologo
2	: La preĝo de la pekulo	" 5	: Distra paĝo
3	: Biblia vorto paco	" 5 & 6	: Araba rakonto
3	: OEcuménisme et espéranto	" 6	: La du talentoj
4	: Jarkunveno 1974	" 6	: Kotiztabelo 1974
		"	

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal : 3° trimestre 1974 /// Polycopié par : F.M.C.-
Papier de Presse N° 34.745- /// Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE EN BRIE
/// 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

==========